

Irene kaj Walter KLAG  
kaj kunaŭtoroj

# SAT.IROJ



MOK!  
MOK!

Kvina kajero

Vieno 2018 - 2020  
Eldonejo kaj presejo Klag  
ISBN 978 3 901211 84 3



La titolbildo montras  
birdon en Roterdamo,  
kiu ne partumis  
la Universalan Kongreson.  
Se vi scias ties specian nomon  
bonvolu skribi ĝin al la eldonejo  
Rudolfnergasse 8/11, 1190 Wien, Aŭstrio

Por la sekvaj kajeroj de Sat.iroj ni urĝe serĉas kontribuantojn.  
Bonvole skribu al la eldonejo.

Irene KLAG  
Walter KLAG patro  
Walter KLAG filo

# SAT.IROJ

Kvina kajero

HAVO ENA

ALBUMO FINVENKA  
HUNDO MURDIS CEZARON  
POEMO - SENSACIA TROVO  
KAFEJO LINGVA

## ALBUMO FINVENKA

An advertisement for STRATO featuring a man with glasses and a beard, smiling, wearing a grey suit jacket, a dark shirt, and a dark tie. The background is a solid orange color. In the top right corner, the STRATO logo (a white square with a stylized 'S' shape) and the word "STRATO" are displayed in white. The main text is in blue and white.

**„Kein Virtual Server ist günstiger als bei STRATO. Außer bei STRATO!“**



Travivi komt uit de kunsttaal Esperanto  
en betekent "Beleven"

**PROVAMO)**

**Zeigt uns euren Weg!**





Trovita de Irene

# Glacio

ice cream specialities





**pir.amido**

## HUNDO MURDIS CEZARON

Proksime de la Kapitolo en Romo oni trovis damaĝitan marmoran tabulon kun sensacia surskribo:

⏟ ⏟  
| CETER CENS CAV CAN  
| CAES IMP XXXXIII AC |  
⏟ ⏟ ⏟ ⏟

Facile oni povas kompletigi la tekston:

CETER CENS CAV CAN  
CAES IMP XXXXIII AC

CETER[UM] CENS[EO] CAV[E] CAN[EM]  
CAES[AR] IMP[ERATOR] XXXXIII A[NTE] C[HRISTUM  
NATUM]

Cetere mi opinias ke oni timu la hundon, (Julio) Cezaro imperiestro (en la jaro) 44 antaŭ la naskiĝo de Kristo.

Ekspertoj ekzakte konstatis la aĝon de la tabulo: Ĝi fariĝis unu tagon antaŭ la morto de Cezaro. Tiel estas pruvite, ke ne Bruto kaj sesdek aliaj viroj, sed hundo murdis la dian imperiestron.



# POEMO - SENSACIA TROVO

En la biblioteko de Mongola Esperanto Asocio MEA troviĝas ekzemplero de Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto<sup>1</sup>. En 1990 la arkivisto malkovris inter la paĝoj 454 kaj 455 flaviĝintan folion kun manskribita poemo de Vilhelmo Novo. Pro multaj truoj faritaj de papertineoj (latine phyllonorycter papyrus)<sup>2</sup> ne ĉiu vorto estas klare legebla. Tial la arkivisto sendis la poemon al Japana Esperanto-Asocio, kiu transdonis ĝin al Ito Kanzi<sup>3</sup>, kiu esploris vivon kaj verkaron de Vilhelmo Novo kaj klopodis “rekonstrui” la poemon. Nur post la morto de Kanzi oni trovis jenan tekston:

## Vivo de Novo

Vilhelmo Novo estas pseŭdonimo de William Newman. Li naskiĝis la 23an de Julio 1890 en Ploc Loch Aillse, Skotlando. En 1908 li veturis al Glasgow kaj hazarde vidis ŝildon ĉe la klublokalto de Glasgova Esperanto-Societo, kie li ricevis bazajn informojn pri Esperanto. 1914 li veturis al Parizo por partumi la Universalan Kongreson, kiu ne okazis pro la eksplodo de la Unua Mondmilito. 1936 Novo renkontis dum fervoja veturo William Auld<sup>4</sup>, kiu tiam estis 12-jara kaj tiel havis la unuan kontakton kun la Internacia Lingvo. La 1-an de aprilo 1937 Novo ekveturis ŝipe de Londono al Sankt Peterburgo, kie li alvenis la 17-an de aprilo. Verŝajne li volis renkonti esperantistojn en Sovetunio. Pliaj informoj pri la vivo de Novo ne ekzistas.

(Fino de la teksto de Kanzi).

# Vilhelmo Novo: LIBERIGŬO

*Rekonstru-propono de Ito Kanzi*

La boteloj staras grupe.  
Malamike. Mute. Pupe.  
Grandaj nomoj fanfaronas,  
Sed ne vere ege bonas.  
Vino kaj likvoro, brando:  
Mankas ne eĉ unu lando!  
(...) levas (...) martelo (?)  
(...) gaje (?) split (...)  
Streku for min de la (...),  
Mi ne estas ebriisto!  
Emanadas odoraĉo,  
(...) iĝas kaĉo.  
(...) ĉeso,  
(...) promeso.  
alkohol (...)  
(...) venen (?).

(Rimarko: La resto de la poemo mankas)

<sup>1</sup> Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. 2-a eldono. Zamenhof Ludwig-Lazarus. Paris: Hachette 1903.

<sup>2</sup> Tiu tineo estas ege malofta kaj vivas en malgranda regiono nordoriente de Ulan-Batoro.

<sup>3</sup> 1918 ĝis 2005.

<sup>4</sup> William Auld, skota poeto, 1924 ĝis 2006.

Reagoj el la tuta mondo:

1) Dankegon, ni Vienaj Esperantistoj omaĝis al Vilhelmo la Olda ĵuse en nia kunveno VERo, kaj tie traktis similŝencan, similtaman poeziaĵon lian.

Gratulon!

Magistro Nekonato, Vieno

2) Estimataj,

Unu blankaĵon en la poemo de Vilhelmo Novo ne nur mi, sed certe ankaŭ freŝulo en Esperantujo povos plenigi, tiamaniere:

"Streku for min de la LISTO, mi ne estas ebriisto!"

La nocio ebriisto estas laŭ mi tipa por Skotlando, kiu sukcesis pluvivi malgraŭ la mondfama ega produktado kaj konsumado de viskio.

Evidente la skotaj hepatoj ne estas kompatindaj.

Kiel Vienano mi estas granda amiko de la skotoj, ja ni havas toponimojn: Schottentor (Skota Pordego) , Schottenring (Skota Ringstrato), Schottenkirche (Skota perĝejo) ĉe ni.

La fiŝercon, ke Skotlando estas Bavarujo sen "B" mi forte malakceptas!

Jen kelkaj komentetoj pri tiu eksterordinara malkovro prigratulinda, escepte de la bedaŭrinda fakto ke mongolaj tineoj emas formanĝi prialkoholajn poemopartojn.

Respektoplene,

Universitata profesoro doktoro Minescias, Vieno

3) La afero estas centelcente inventita.

Doktoro P. P., Anglio

# KAFEJO LINGVA

## Originala dramo unuscena

*Studentino S eniras kafejon kaj sidiĝas. Kelnero K alrapidas.*

K: Kion vi deziras?

S: Mi volas kafo.

K: Kio mankas?

S: Bonvolu!

K: Ne, kiu finaĵo mankas?

S: Ho jes, kafon, bonvolu!

K: Kun kio?

S: Kafon kun sukero kaj lakton!

K: Tio estas tro!

S: Stranga kafejo, en kiu mankas sukero kaj lakto!

K: Du finaĵoj ester tro! Mi volas kafon kun sukero kaj lakto.

S: Ĉu ankaŭ vi volas kafon? Mi ne estas kelnero!

K: Kaj en la pasinteco?

S: Mi ne estis kelnero!

K: Nun la futuro!

S: Mi ne estos kelnero. *(laŭte)* Se mi ne baldaŭ ricevas mian kafon, *(tre laŭte)* mi iras!

K: Unue la pasivan formon!

S: *(batas forte per la mano sur la tablon)* La kafo riceviĝas de mi, de vi, la kafo estas ricevata, estis ricevonta, ...

K: *(laŭte)* Ne faru bruon, aŭ vi ...

S: *(stariĝas kaj disbatas sian seĝon sur la tablo)* Mi faras bruon, mi faros bruon, mi faris bruon, la bruon estas farata de mi, farota, fariĝas, ...

K: *(krias)* Se vi ne tuj ...

*De malproksime oni aŭdas la sirenon de polica aŭto.*

S: *(krias)* Kaj vi, vi estas la plej ...

K: *(krias)* Kio mi estas?

*Studentino fuĝas.*